


# PONTO☆

*Jaro 4 N-ro 4(24) Organo de Sunda Esperanto Agado okt. 2005*

## SEA-KUNSIDO

**La 9-a SEA-kunsido okazos en nia klubejo Kronetorpsgatan 94 Malmö, sabate la 22-an de oktobro 2005 je la 11.00a h ĝis la 15.00a h.**

**Tagordo**

1.Elektoj de gvidanto kaj protokolant
2. Programo:
   Raportoj pri la pasinta periodo (hejmpaĝo, kursoj, esperantoaranĝoj kaj pri la planoj de la kluboj)
3. Vidpunktoj de Ponto – aparte hejmpaĝo
4. Laborplano en la kluboj por la venonta periodo
5. Diskuto pri kursoj kaj aranĝoj
6. Ekstera informado
7. Daŭrigo de la serio ekskurso kun prelego
8. Ceteraj demandoj
9. Venonta SEA-kunsido

**Ni preparos etan manĝaĵon je malalta kosto. Koran bonvenon al la SEA-renkontiĝo. Bonvolu anonci vin al karin@agado.net aŭ telefone 040-98 01 20**

## UK en Florenco 29 julio - 5 aŭgusto 2006

Rimarku ke se vi anoncus vin al la kongreso 2006 laste la 31.12.05 vi pagos la plej malaltan kotizon
Informoj sur paĝo 6

## Unu-taga paroliga kurso por la SEA-regiono en Malmö sabate la 12-an de novembro inter 10-16 h.

Partoprenu la kurson kaj parolu pli libere dum la jubilea kongreso venontjare!

Gvidanto: Ann-Louise Åkerlund.
Ni preparos etan lunĉon je malkara kosto.
Aliĝu al Karin tel. 040-98 01 20 aŭ karin-lindquist@telia.com
aŭ Per-Olov tel. 040-26 31 94

## Librofoiro en Kopenhago

18-20/11 Librofoiro, "BogForum" ĉe la metroa stacio Forum. DEA deĵoras tie la tutan tempon: vendrede kaj sabate de la 10a-19a horo, dimanĉe de la 10a-18a horo.
Dimanĉe je la 11a horo Robert Phillipson tie prelegos pri sia libro "Ĉu nur-anglalingva Eŭropo?" kaj poste subskribos ekzemplerojn de ĝi – laŭeble zorgu ĉeesti! Unutaga bileto kostas 85 kronojn; dum la vendredo studentoj pagas nur 50 kronojn.

## La trofeo Fyne

La trofeo Fyne, starigita memore al Adam kaj Erica Fyne el Kanado kaj donata ĉiun duan jaron al la plej sukcesa landa asocio de UEA, estis aljuĝita al Dana Esperanto-Asocio

La redakcio de Ponto elkore gratulas al DEA!

Nästa **Ponto**, nr 5
utkommer ca 10.12.
Skicka allt material till *Karin Lindquist*
senast den 3.12

*Sunda Esperanto Agado*
Reto de la Esperanta kunlaboro en la Sunda regiono

Redaktionskommitté/*redakta komitato:*
**Kontaktperson:** *Karin Lindquist* *karin@agado.net*
Sergels väg 14A, SE-217 57 Malmö +46 40 98 01 20
Övriga/kromaj anoj: Sten Svenonius (paĝaranĝo), Johan Svenonius (tekniko), Per-Olov Johansson (presado),


ISSN 0907-127X

# La Folio

Klubo Esperantista de Malmö

*Jaro 76 N-ro 4 (693)* >>Ĉiam antaŭen<<

Fondita en 1906


**Je memoro de Brita Sjöblom la klubo ricevis mondonacon de:**
Gertrud Lund
Gulli Svensson
Karin Lindquist



## Ordinara kunsido 7.9

Protokolo ĉe ordinara kunsido la 7-an de sept.
La prezidanto Sten Svenonius malfermis la kunsidon kaj bonvensalutis la partoprenantojn
Åke Palm elektiĝis kiel protokol-kontrolanto
La prezidanto informis pri la aŭtunaj kursoj
Gertrud Lund informis pri la aŭtunaj programeroj
Jenaj elektoj okazis:
Aŭtuna festkomitato: Elsy kaj Albert Vel, Alf Mobark, Ulla Ullfors
Aŭkcio: Gerd Rodén, Gertrud kaj Agneta Lund, Karin Rylander, Sten Svenonius, Alf Mobark
Kafkomitatoj: 7/9 Per-Olov Johansson, 31/9 Gertrud Lund, 5/10 Asta Schaedel, 26/10 Karin Lindquist, 9/11 Per-Olov Johansson, 7/12 Per-Olov Johansson kaj Karin Rylander
Sten Svenonius informis pri la estrara propono pri jarkotizoj.
Estis decidite ke la kotizoj por 2006 estu:

**Membreco de Klubo Esperantista de Malmö (KEM):**

| | |
|---|---|
| Membro de KEM | 150 kronoj |
| Junulo ĝis 20 jaroj | 60 kronoj |
| Familio | 200 kronoj |

**Membreco de KEM kaj Sveda Esperanto Federacio (SEF):**
La membro pagu la koston deciditan de SEF kaj kiun la klubo devas plusendi al SEF. Ne plu okazos subvencio de membrokotizoj de SEF pro malkreskanta ekonomio de la klubo

| | |
|---|---|
| Membro de KEM/SEF | 310 kronoj |
| Junulo ĝis 20 jaroj | 140 kronoj |
| Familio | 440 kronoj |

Abono je gazetoj por 2006 estos Monato kaj La Ondo

Estis decidite ke abono por Ponto estu 70 kronoj por 2006
Estis informite pri la laboroj pri la venontjara kongreso en Malmö

Poste Gertrud Lund raportis pri la ĉi-jara SEF-kongreso en Haninge.


Malmö Esperantoförening
*Kronetorpsg 94, SE - 212 27 MALMÖ*
☏ 040-18 71 90
Poŝtĝiro: 3 87 14 - 2

Prezidanto:
*Sten Svenonius* *sten@agado.net*
☏ 040-19 14 77




**21.09 UK en Vilno**
Partoprenintoj en la mondkongreso de UEA en Vilno Sten, Albert, Elsy, Asta kaj Ursula rakontis pri siaj travivaĵoj dum la kongreso en kiu ĉ. 2.400 personoj ĉeestis.

Ĉar ili partoprenis en diversaj programeroj ni ricevis bonan superrigardon kaj de la kongreso kaj de la urbo. En la infana kongreseto partoprenis Nora Svenonius, kiu tre amuziĝis kun novaj amikoj.
Ursula kiu por la unua fojo partoprenis mondkongreson estis tre kontenta.
Ĉiuj partoprenantoj ricevis belan esperantlingvan libron pri la urbo, eldonitan de la komunumo.

Tagordo 9.11
1 Elekto de protokolkontrolanto
2 Diskuto kaj decido pri printempaj kursoj
3 Diskuto kaj decido pri printempaj programeroj
4 Eventualaj elektoj
5 Abono je esperantogazetoj
6 Raportoj kaj informoj
7 Ceteraj demandoj

## Medlemsavgifter 2006


Då klubbens ekonomi blivit mera ansträngd subventioneras inte längre medlemskapet i SEF från år 2006, varför medlemmarna måste betala den faktiska kostnaden.

| | |
|---|---|
| Medlem i MEF | 150 kr |
| Ungdom t.o.m. 20 år | 60 kr |
| Familj | 200 kr |

| | |
|---|---|
| Medlem i MEF/SEF | 310 kr |
| Ungdom t.o.m. 20 år | 140 kr |
| Familj | 440 kr |

# Kontaktilo





# Klubo Esperantista de Helsingborgo

**Karaj klubanoj kaj legantoj de Ponto.**

Kvankam la somero daŭris sufiĉe longe, jam estas aŭtuno, kaj la kluboj denove aktivas. La laboro en nia klubo, tamen, iom lamas, pro foresto de jen unu jen alia de niaj aktivaj membroj. Mi mem nun vojaĝas dum preskaŭ du monatoj. Pro tio ni decidis nuligi nian klubkunvenon la 16-an de oktobro kaj anstataŭ partopreni la aŭtunan feston en Malmö sabate la 15-an. Espereble vi ĉiuj jam aliĝis.

Nia merkreda studrondo ĉe Barbro okazos, se estos minimume tri partoprenantoj. Kontaktu ŝin se vi volas veni! ( 042-121471)

Jill anstataŭos min dum la SEA-kunveno en Malmö la 22-an de oktobro. Sciigu ŝin pri viaj ideoj kaj opinioj! (042-130170)

Kiam vi legas ĉi tion, mi kaj mia edzo verŝajne troviĝas ie en Francio survoje al Portugalio kaj Hispanio per karavan-aŭto. Mia intenco estas, ke mi provos sendi raportojn al la Agado-listo kiam mi trovas la eblecojn retumi. Tio ne devus esti tro malfacile en nuntempa Eŭropo. Ni revenos por la paroliga kurso en Malmö en novembro kaj por nia klubkunveno la 20-an de novembro.

Ĝis revido!
Ann-Louise




---

# La Esperanto klubo de Lund

**Saluton ĉiuj**

La 8-an de septembro komenciĝis nia aŭtuna agadsezono. Ni ĝojis vidi gastojn el Helsingborg kaj novulon el Hässleholm, nome Joakim Andersson. Li ekstudis esperanton per koresponda kurso kaj antaŭ kvar jaroj partoprenis kurson en Karlskoga. Je propra surprizo li ne nur komprenis, sed li ankaŭ kuraĝe parolis.
Iom el la programo de tiu vespero: Ulla Saether rakontis kaj montris ”fotolibron” pri vojaĝo al tunezia insulo.
Ingrid Malteson amuziĝis farante sapvezikojn kun tri knabetoj en sia korto. Kun Stig Wingårdh ni vojaĝis buse al Norvegio kaj A-M Lange denove ĝuis la avantaĝojn havi la t.n. ”Sommarkortet” (por aŭtobusaj kaj trajnaj vojaĝoj).Tiu karto estis novaĵo por Ursula Kwasniewska, kiu iom parolis pri sia unua UK. Ann-Louise Åkerlund legis el fabelaro, kiu temas pri Esperantolando kun reĝo antaŭ centoj da jaroj.
Alie: preskaŭ pretas nova ĉapitro en nia kolekto pri famaj svedoj kaj afrikanoj, nome pri Dag Hammarskjöld (Stig W.) kaj aldoniĝis teksto pri Julius Nyerere (A. Polle).

**Aparte menciindas:**
Lunde 24.okt, je la 17-a h. TAGO DE UN, en kiu LEK partoprenos
Ejo: Kulturen. Por LEK-anoj senpage. Temo Dag Hammarskjöld,
FN och ett delat ansvar för mänskliga rättigheter (Magdalena Bexell)
Emil Jensen:Poesi, musik, stå upp!



Ĝis Anna-Maria

---

## SEI-seminario en Lesjöfors

Dum la semajnfino 16-18 de septembro 2005 Sveda Esperanto-Instituto aranĝis seminarion en Esperanto-Gården en Lesjöfors. Samtempe la Esperanto-Asocio de Finnlando vizitis nin dum siaj Aŭtunaj Tagoj. Ili venis per aŭtobuso de Stokholmo kaj dum la vojo vizitis interesajn lokojn, gvidataj de Anita Dagmarsdotter.

La temo de la seminario estis kulturo – precipe muziko kaj literaturo. Tiina Oittinen, violono, kaj Lauri Liukkonen, akordeono, kune kun Anja Karkiainen, poeto kaj tradukisto, prezentis esperantigitajn finnajn kantojn, kaj Martin Strid kantigis nin per eroj el sia kolekto de svedaj popol- kaj popularaj kantoj. Odd Tangerud el Norvegio prezentis poemojn i a el Islando kaj el la finna ”Kalevalo”. Kerstin Rhodin mallonge parolis pri Astrid Lindgren kaj la figuroj en ŝiaj libroj. Bertil Nilsson prezentis skizon pri esperanta ide-historio.

La tagoj estis plenaj je programeroj, plejparte tre bone elpensitaj. Ekzemple: literatura kvizo, kiam ni devis kunligi la komencan frazon de diversaj literaturaj verkoj kun iliaj aŭtoroj. Svedoj kaj finnoj devis kunlabori en etaj grupoj – pro tio ke temis pri verkoj de kaj svedaj kaj finnaj aŭtoroj.

Sabate posttagmeze estis aranĝita ekskurso al Mårbacka, la hejmo de Selma Lagerlöf.
Samtempe kun la ekskurso estis tempo por la jarkunvenoj de Eldona Societo Esperanto kaj Esperantogården. Poste SEI (Sveda Esperanto-Instituto) havis sian jarkunvenon. Kiel estraranoj de SEI elektiĝis Lars Forsman (prezidanto), Inga Johansson, Ann-Louise Åkerlund, Birgitta Anevik kaj Folke Wedlin.

Spite al la densa programo estraranoj de SEF kaj EAF trovis tempon kune diskuti pri eventuala estonta kunlaboro. SEF celebras sian 100-jariĝon printempe de la jaro 2006 kaj EAF dum 2007.

Entute la semajnfino estis interesa, agrabla kaj espereble fruktodona. Mi aludas ne nur la diskutojn inter estraranoj de SEF kaj EAF, sed ankaŭ interŝanĝojn de ideoj inter unuopaj esperantistoj.

Ann-Louise Åkerlund

| | | |
|---|---|---|
| Ĵaŭde 13.10 | LEK, Lund | Impresoj pri la UK 2005—Asta Schaedel kaj Ursula Kwasniewska |
| Lunde 17.10 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj. Kim montros televidprogramojn |
| Lunde 24.10 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj kaj studgrupoj |
| Merkrede 26.10 | KEM, Malmö | La somero kiu pasis - miaj travivaĵoj |
| Lunde 24.10 | LEK, Lund | TAGO DE UN, en kiu LEK partoprenos. Ejo Kulturen Temo: Dag Hammarskjöld, FN och ett delat ansvar för mänskliga rättigheter. Emil Jensen: Poesi, musik, stå upp! Por LEK-anoj senpage |
| Lunde 31.10 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj. KEF- Esperanto-kulturo en festivalo. Kim kaj Lene prezentos |
| Marde 2.11 | KEKG, Kopenhago | ”Vasilj Eroshenko - pri la mondkoncepto de la blinda, ukraina Esperanto-poeto kaj verkisto - parto 2” |
| Lunde 7.11 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj. Brita Olsson rakontos pri sia vivo kiel urba ĉefbibliotekisto en Kopenhago. Ŝi estis aktiva en ”Dansk Kvindesamfund” (Dana Asocio por Virinoj), kaj ŝi rakontos pri sia Esperanto-vivo |
| Merkrede 9.11 | KEM, Malmö | Ordinara kunsido. Tagordo p. 2. Poste Lingva kvaronhoro |
| Ĵaŭde 10.11 | LEK, Lund | Vojaĝo al Kirgizio. Daniel Granello rakontos |
| Sabate 12.11 | SEA, Malmö | **Por SEA-regiono:** unutaga paroliga kurso inter 10-16 h. Ann-Louise Åkerlund gvidos, vidu p. 1 |
| Lunde 14.11 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj kaj studgrupoj. Arne Casper, ĉefdelegito de UEA por Danio, rakontos pri la 2006-jara UK en Florenco (IT) - prezoj, aliĝoj, informoj ĝis nun haveblaj... |
| Dimanĉe 20.11 16.00 h | KEM, Malmö | Aŭkcio - auktion. Se bif. inbjudan. Tag med vänner och bekanta Alla hjärtligt välkomna |
| Dimanĉe 20.11 | HEK, Helsingborg | Klubkunveno |
| Lunde 21.11 | KEK/DEFA, Kph | Kurso. Numerludo |
| Lunde 28.11 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj kaj studgrupoj |
| Sabate 3.12 | LEK, Lund | LEK 75-jara datreveno; aparta invitilo elsendota |
| Lunde 5.12 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj. |
| Merkrede 7.12 | KEM, Malmö | Tiel mi memoras la solenadon de miaj infanaĝaj Kristnaskoj - bv rakonti. Kafo kun luĉifestaj kringoj kaj spickuketoj |
| Sabate 10.12 | KEKG, Kopenhago | ”L.L. Zamenhof-vespero” 10.12 je 19.30 en Medborgerhuset Danasvej 30 B, 2 etaĝo. Dum la vespero ni kiel kutime ofertos i.a. manĝaĵon, glason da vino, teon/kafon kaj kukojn ktp. Prezo 50 kr. Plej malfrua aliĝo: la 6-a de dec. al Torben Svendsen, Tlf: +4538749764 |
| Lunde 12.12 | KEK/DEFA. Kph | Julemik |

# Informoj pri esperantokluboj kaj grupoj de SEA

**Klubo Esperantista de Malmö, K.E.M.**
La kunvenoj komenciĝas je la 18.30 h
en Kronetorpsgatan 94, 212 27 Malmö
Kontaktpersonoj: sten@agado.net
aŭ karin@agado.net
Karin Lindquist,
Sergels väg 14 A, 217 57 Malmö,
tel. 040-98 01 20

**La Esperanto Klubo de Lund, L.E.K.**
Niaj monataj kunvenoj okazos ĉiun duan jaŭdon en monatoj sept.-majo je la 18.30-a h. en la ejo de nia studorganizo SENSUS, Krafts torg 12 A.
Kontaktpersonoj: Anna-Maria Lange, Bredgatan 27, 222 21 Lund, tel. 046-147309
aŭ rete: Allan Ljungstedt, allan.ljungstedt@telia.com

**Klubo Esperantista de Helsingborg, K.E.H.**
La kunvenoj okazos je la 14-a horo en Faktorsgatan 5.
Bonvolu informiĝi ĉe Ann-Louise Åkerlund tel. 042-291262 aŭ 042-186639 (oficejo) aŭ ĉe Barbro Haraldsson tel. 042-121471

*Hejmpaĝo de SEA*
*www.agado.net*

**Konversacia Esperantista Klubo Kopenhago, K.E.K.**
Kunvenas en la ejo de DEFA. Vidu la informojn tie. Prezidanto: Kim J. Henriksen, tel. 0045-32 54 93 54. Rete: kek@esperanto.dk

**Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo, KEKG**
Aranĝoj en Medborgerhuset, Danasvej 30 B, atingebla per buslinio 29 el stacio Vesterport,salono n-ro 1, dua etaĝo. Pordoj malfermitaj 19.00-23.00.
Ĉiu prelego okazos ĉ. 19.30 – 20.30.
Se vi deziras detalojn pri la prelegoj aŭ havas demandojn pri la aranĝoj bonvolu turni vin al Torben Svendsen, Vanløse Alle 57, DK-2720 Vanløse. Tel. 0045-38 74 97 64
Persone al la kontaktulo de KEKG:
Torben Svendsen: esperanto@webspeed.dk
Al la asocio - KEKG: kulturgrupo@webspeed

**Fervojista klubo en Kopenhago, DEFA**
Kunvenas lundojn inter 19.30-22.00 en Banedanmark, entreprise, Vasbygade 10.
Por eniri: uzu la sonorilon ĉe la (krd)pordo.
Kontaktulo: Lene Niemann,
tel. 0045-49 26 13 19
Rete: niemann@kabelmail.dk
Kluba retadreso: defakek@hotmail.com

# UK i Florens 29 juli—5 augusti 2006

Anmälningsavgifter (Svenska kronor)

| | | -31/12-05 | -31/3-06 | efter 1/4-06 |
|---|---|---|---|---|
| 1 | Direkt medlem i UEA ( MG) | 1.505 | 1.880 | 2.260 |
| 2 | Icke direkt medlem i UEA | 1.880 | 2.350 | 2.820 |
| 3 | Medföljande, handikappad eller ungdom (född mellan 76-01-01 och 85-12-31 som är medlem i UEA | 755 | 940 | 1.130 |
| 4 | Medföljande, handikappad eller ungdom, som inte är medlem i UEA | 1.130 | 1.410 | 1.695 |

Handikappassistenter och ungdomar födda efter 86-12-31 betalar ingen kongressavgift.
Anmälningsblankett för kongressen kan beställas hos:
Lisbet Andreasson Södra Rörum, Husarlyckev. 20, 242 94 Hörby. Tel. 0415-501 52